# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 6 Junio, 2016

*Karaj legantoj, en ĉi numero de la bulteno "Saluton!" abundas informoj de la tuta mondo. Al la Societo aliĝis s-no T. Hancock, kiu tuj rakontis pri sia ofic-vojaĝo al Japanio. M. Mamedov, E-isto de nia ĝemelurba klubo de ukraina ĉefurbo Kijivo rakontas pri E-boatado, organizita per E-istoj de alia nia amika E-kolektivo el Vilno (Litovio). Prof. John Wells (Britio) aperigis leteron de sia amiko pri la planat voĉdonado Brexit (jam okazis) – ĉu nova ŝanco al Esperanto en EU anstataŭ la angla?*

*Ne forgesu pri tradicia E-pikniko Dimanĉo, Junio 26, Tagmezo – 4ptm: Cobbler Square (Ŝuista placo), 1350 N. Wells St., Chicago. Ĝis la!* –La Redaktoro

## Tradicia E-pikniko

*Nia tradicia someraj E-pikniko ĉi jare okazos en la loko de la lastaj monataj kunsidoj: Cobbler Square (Ŝuista Placo) laŭ adreso 1350 N. Wells St., Chicago. Apudas stacioj de Bruna Linio (Sedgwick) kaj Ruĝa Linio (Clark/Division). Eblas veni per auto, sed parkejo estas limigita (bv kontakti Viktoron laŭ tel. 773-344-2276). Tempo estas kutima: tagmezo – 4ptm. Nepre prenu tiujn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, kiujn vi ŝatas kaj preferas. Ne forgesu pri manĝilarojn. Eblas bani en ĵakuzo. Ĝia la revido!*



## Festo en Hachinohe

Mi ĉiam sciis pri la ekzisto de io nomita "Esperanto" kaj ĉiam estis interesinta pri lingvoj. Lastatempe mi pensis pri aferoj farotaj post mia pensiiĝo kaj mi trovis libron nomita "In the Land of Invented Languages" (En la lando de inventitaj lingvoj) de lingvisto Arika Okrent. Ĝi enhavas plurajn ĉapitrojn pri Esperanto (krom Lojban, Volapuko, la Klingona kaj aliaj), kie aŭtorino donas iom de historio de Esperanto kaj rakontas pri sia lernado de la lingvo kaj ĉeesto dum la Landa Kongreso en Havano, Kubo. Mi decidis tiam, ke unu el miaj projektoj, kiam mi retiriĝos, estos lernado de Esperanto. Mi tiam komencis lerni iom pli pri Esperanto, kaj iĝis hokita.



Mi trovis ĉi tion dum rigardado por io alia. Estas bildkarto el la urbo Hachinohe en Japanio. Mi estis tie en jaro 1994 pro mia laboro. La bildo montras la Feston de Tri Sanktejoj de Hachinohe (Hachinohe Sansha Taisai).

La parado havas multajn platformojn, ĉiuj buntaj kaj belaj. La platformoj estis tirataj per multaj homoj (kaj infanoj) uzante du ŝnurojn. Inter la ŝnuroj estis junuloj, kiuj ludis flutojn. Tamburistoj rajdis sur la platformoj, kie oni bildigis lokajn legendojn.

Dum unu tre Varma nokto de festado ĉiuj estis lokitaj en urbomeza parko. Multaj homoj venis vidi la platformojn. Mi kun miaj amikoj povis marŝi ĉirkaŭ la platformoj. Ni renkontis junan virinon de Aŭstralio, kiu ludis fluton. Ŝi diris, ke ĉiuj flutistoj ludis la saman muzikon.

Se vi vojaĝos al Japanio en Aŭgusto, iru al Hachinohe kaj spertu ĉi tiun festoon! –*Tom Hancock*

# Jam la 50-a, Jubilea BOATADO!



Tradicia esperanto-renkontiĝo organizata far Vilniusa E-klubo "Juneco" en nacia parko de Litovio proksime al urbeto Ignalina okazis la 27-29-n de majo jam 5-an fojon!. Tri majaj tagoj. Tri tagoj da amikeco, "festa ĝojo, tenera konsol'..." Jam tradicie vespere la 26-n al la starta loko (vil. Paluŝe) venis okopa avangardo. Okazis "provludo" – kantoj ĉe la lignofajro, gustumo de manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Sekvantmatene venis la partoprenantoj. La renkontiĝo komenciĝis de solena malfermo kun komuna solena ĵuro. Tuj post tio ni ŝarĝis la ok boatojn kaj fornavigis. La navigado pasas de lago al lago tra pitoreskaj riveretoj. Kelkaj dezirantoj naĝis.

Proksimume je la 16-a horo ni venis al loko de la noktumado. Malŝarĝo de la boatoj, starigo de la tendoj, sportludoj, preparo de la vespermanĝo. La vespero trapasis en amika, gaja etoso de interkona vespero, post kiu ĝis malfrua nokto sonis kantoj ĉe la fajro.

La sekvan matenon la boatoj kaj la aĵoj estis transportitaj al alia lago pere de speciala aŭto. De tie la vojo daŭris. Dum la rem-navigado ni vizitis lageton en malgranda insulo, kie okazis tradicia evento – tago de naskiĝintoj. El la boatoj estis farita rondo, ĉiuj majaj naskiĝintoj estis kronitaj per herbaj plektaĵoj, trairis de boato al boato tutan rondon, ricevis gratulojn kaj donacetojn. Iom pli poste surborde okazis komuna manĝo. Ĉi tage la Laga Dio venigis nian boatkaravanon al vilaĝeto Ginuĉiai, en kiu troviĝas malnova digo kun muelejo (nun funkcias kiel muzeo). Ĉi tie ni portis la boatojn trans la digon kaj daŭrigis la vojon tra mallarĝa rivereto "torde, plekte, volvmalrekte" direktanta nin al la sekva lago.

Venis la lasta tago. Ni fornavigas al loko de nia starto – luejo de boatoj en Paluŝe, tiel finante rondnavigadon tra Ignalina lagaro. Ĉi foje ni tradicie vizitis monton Ladakalnis, sur kies supro kreskas kverko kaj de kie ni vidis belegajn vidindaĵojn de la naturo. Ankoraŭ unu halto estis por la tagmanĝo.

Ĉio finiĝas, ni revenas al la starta punkto. Solena fermo. Parolo de la organizantoj, de verda polico, donacoj... La renkontiĝon partoprenis 31 personoj el Litovio, Latvio, Ukrainio, Germanio, Pollando, Ĉeĥio, Katalunio. *–Murad Mamedov, Kijivo (UA)*

# Pensoj pri la Brexit '2016 de Prof. John Wells



Some of my friends and relations have told me they will vote for Brexit in our referendum. At the risk of falling out with them I intend to vote for us to remain in the EU. I grew up in a time of post-war austerity. My country, the United Kingdom of Great Britain and Northern Ireland, was broke and virtually in ruins. Germans were still "the enemy" in children's games. Bomb sites and abandoned air-raid shelters were our playgrounds. Nine years after the war ended butter, meat and sugar were still rationed. One couldn't buy sweets without coupons issued by the government.

Portugal and Spain were fascist dictatorships. In Spain unauthorized gatherings of more than 3 people were illegal. A military junta later seized power in Greece. Half of Europe was sealed off behind the Iron Curtain. I remember lying in bed at night, in my parents' home, and hearing the roar of American warplanes flying overhead on their Cold War missions. We were told that, if the Russians unleashed their missiles, we would get 4 minutes' warning of Armageddon...

[By 2016, Europe has come so far with the unity of the EU.] No member state has ever applied to leave the EU. There have always been candidates to join but first they must have democracy, the rule of law, a market economy and guarantees for the protection of minorities and human rights. They also need the support of ALL existing members, including us, without which they cannot join. In my opinion it would be a shame if Britain were to turn its back on Europe, give up its voice and influence, and opt for an uncertain future. So, I shall vote IN.

*La 24an de Junio, matene oni anoncis rezultojn de la voĉdonado: 51.9% - por Brexit. Ĉu aperis nova ŝanco por Esperanto en EU?* (Redakcia noto)

## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Randy Ream
1835 N. Natoma Ave., Chicago, IL 60707
773-262-7738
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn
Membro – Hans Becklin

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn
828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

1350 N. Wells St., Ŝikago. Bonvenon! Apudas stacioj: Sedgwick (Bruna linio) kaj Clark/Division (Ruĝa linio). Por senpaga parkejo bv telefoni al Viktoro: (773) 344-2276. Vi rajtas preni vian ŝatatajn ne-E-amikojn, manĝaĵojn kaj trinkaĵojn (dolĉakvon, bieron, vinon ktp).

**26an de Junio** – Tradicia E-pikniko

**26an de Julio** – Gvidos Randio

**23an de Aŭgusto** – La 101-a UK en Nitro

# Filmeto pri Esperanto-kurso

Dank' al subvencio de ESF, 12 entuziasmaj studentoj de la Honora Kolegio Macaulay de CUNY (Universitato de Novjorko) partoprenis en kvin-semajna Esperanto-kursaro somere 2015. Reĝisoro Sam Green faris filmeton pri la kursaro – ĝi spekteblas ĉi tie : https://www.youtube.com/watch?v=TTM2U4y7CXI *-ESF*